8-a JARO, N-o 365 LEIPZIG, 1. / 10. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

Kiun direkton sekvos la laborista movado en Hispanio?

Estas nekontestebla fakto, ke la revolucio en Hispanio, kiu renversis diktatorecon k monarkion, kiom ajn orde, trankvile k sensange ĝi okazis, estigis en la popolamasoj profundan agitiĝon, kies vibrado postdaŭras k ne tendencas ekripozi nuntempe. Kun la stariĝo de la hispana respubliko prezentiĝis antaŭ la hispaniaj laboristaj organizoj gigantaj taskoj, laŭ kies parta aŭ kompleta plenumado estas permesite al ni mezuri influon, lerton k kapablon de tiuj unuiĝoj k de iliaj gvidantoj en la klasbatalo. Precipe tiuj konsideroj valoras por la multanara, preskaŭ milionon da membroj havanta revoluciema sindikataunuiĝo (kun anarko-sindikatista tendenco), la „Nacia Konfederacio de Laboro“ (N.K.L.). La momento estis veninta por ĝi, por elmontri sian batalan kvaliton, por pruvi, ke ĝi estas kvalifikita por konduki la bataleman laboristaron al la definitiva venko super la burĝa klaso, al la triumfo de l'Socia Revolucio.

Depost la 14-a de aprilo, tago de la stariĝo de l'respubliko, la popolamasoj atendadas streĉe, pretigas sin por batali, febras por realigi tion, kion ili esperas. Oni povus montri al la multnombraj okazaĵoj post tiu 14-a de aprilo, kiuj atestas pri la revoluciema spiritostato de l'laboristaj amasoj en Hispanio; multajn tagojn en la kalendaro ni povas signi per ruĝa kruceto, en kiuj okazis sangaj kunpuŝiĝoj kun la gardantoj de l'nuna sociordo, kun la polica aparato de la nova registaro, aŭ kiuj estas signitaj per spontaneaj ekagoj kontraŭ la plej distingaj reprezentantoj de l'kontraŭrevolucia movado, la pastroj k la aristokratoj. Ni vidis ĉi tiujn lastajn ja reorganizi sin, defendi siajn fiajn interesojn, k ni scias, ke ili ne perdis la esperon iun tagon denove supervenki en la politika batalo. Ni devus signi ruĝe ankaŭ tiujn multajn tagojn, en kiuj la laboristoj strikbatalis por siaj ekonomiaj depostuloj. Strikoj eksplodis ĉi tie k tie en senĉesa sinsekvo, k ili havis plej ofte ne nur simplan ekonomibatalan karakteron, sed elstarigis ankaŭ la politikajn bataldevizojn.



En tiu ĉi momento, en kiuj multaj okuloj, esperplene k konfide, precipe en Katalunio, estas direktitaj al la Nacia Konfederacio de Laboro, pli-reliefiĝas en ĉi tiu potenca sindikataro mem lukto inter du tendencoj. Unu moderema, kiu volas batali laŭ leĝa maniero, k alia ekstreme radikala, tiu, kiu esence plej ĝuste respondas al la ĝisnuna sinteno de tiu Sindikata Unuiĝo, al ĝia anarkista idealaro k al ĝiaj ĝisnunaj kongresaj decidoj absolute senkompromisaj. En tiu ĉi senco estis redaktita proklamo, kiun ĝi faris ĉe stariĝo de la respubliko: „La respubliko estas nur la komenco de movado, kies finpunkto estas la socia revolucio.“

Kaj nun ni vidas, kiel 30 aktivaj membroj de la N.K.L., ĉefoj de l'organizo, publikigas *Manifeston*, kies ideoj formas kontraston kun la malnovaj konceptoj de l'Konfederacio. Estas eminentaj gvidantoj inter la subskribintoj: Klara, Pejro, Pestana. Precipe ĉi tiu lasta estas bone konata k estimata pro sia kuraĝa sinteno kiel batalanto en la pasinto, k ĝia nuntempa moderemo estas akre atakata k kontraŭbatalata de la pli radikalaj sindikataj elementoj, kiuj formas la plimulton, de sindikatistaj funkciuloj, kiuj cetere ricevis laŭ regula maniero siajn mandatojn de siaj organizoj. En la lasta Katalunia regiona kongreso de l'N.K.L. la redakcio de „La Laborista Solidaro“ *(Solidaridad Obrera)* estis tre severe kritikata de la *plimulto de l'kunvenintoj*, ĉar ĝi ne prenis la energian sintenon, kiun ĝi konvene devus preni antaŭ la katalunista politiko, k precipe pro tio ke ĝi restis muta rilate al la elektopropagando farita ĉirkaŭ la Kataluna Regularo.[1]

Ni volas nun montri per citoj de partoj el la menciita *Manifesto*, kia estas la sinteno de la moderaj elementoj en la anarko-sindikatista Konfederacio, sinteno, kiu forte ekscitis la pasiojn en la vicoj de l'N.K.L.-anoj k kiu estis multe komentata en la granda hispania ĵurnalaro, interalie ankaŭ en la socialistaj ĵurnaloj, kiuj kun ia kontento notas, ke „se la N.K.L. en Katalunio volus doni al la respubliko la saman saĝan apogon, kiun donas al ĝi la Ĝenerala Unuiĝo de Laboro (la socialist-tendenca sindikat-unuiĝo — *Red.*) en tuta Hispanio, la nuntempaj problemoj povus likvidiĝi per inter-

[1] Pri ĉi tiu *Regularo* legu en la antaŭa n-o de „S-ulo“ („El Hispanio“). — *Red.*

konsento sen timo pri malordoj por la lando.“ Ni publikigas el la nomita *Manifesto* nur la ĉefajn karakterizajn partojn, ĉar plena represo forprenus tro da spaco en nia gazeto.

Post konstato de la faktoj: forkuro de l'reĝo, eksporto de l'kapitaloj, honta k aroga spekulacio de l'plutokratoj, bankieroj, financistoj, kiu sekvigis teruran senvaloriĝon de l'peseto k de l' landa riĉo ĝis 50% k estigis teruran ekonomian krizon, la aŭtoroj diras: „Kaj flanke de ĉiuj malfeliĉoj, kiujn suferas la popolo, oni rimarkas la indulgemon de l'registaro k ties procedojn konformajn al la litero de la leĝo. Ĉiuj ministroj, kiuj fariĝis tiaj per la Revolucio, malkonfesis ĝin, alkroĉiĝ-ante al la laŭleĝeco kiel molusko al la roko; ili elmontras nenian energion krom se temas pafmortigi la popolon. Nome de la Respubliko, k laŭdire por defendi ĝin, oni utiligas la tutan registaran aparaton de l'subpremo k oni verŝas ĉiutage la laboristan sangon.“

Post pliaj riproĉoj al la registaranoj oni legas jenon: „Ĉio, konsekvence, konfirmas, ke venis la momento, kiam la lando devos fari decidojn, por savi la Revolucion, k savi sin mem. La historio asertas, ke la revolucioj ĉiam estas faritaj de maltimemaj malplimultoj, kiuj ribeligis la popolon kontraŭ la konstitucia potenco. Sufiĉus, por komenci, supraĵa preparado de kelkaj atak-elementoj. La triumfo de l'revolucio dependus de la valoro de kelkaj individuoj k de l'duba interveno de la amasoj, en la momento, kiam ĉi tiuj estos en la strato. ...

„ ... Oni konfidas ĉion al la hazardo, oni atendas la neantaŭviditon, oni kredas al la miraklo de l'sankta revolucio, kvazaŭ la revolucio estus panaceo, k ne doloriga k kruela ago, kiun la homo devas plenumi per la suferoj de sia korpo k la doloro de sia spirito. Tiu ĉi falsa koncepto pri la revolucio naskiĝis el la pura demagogio de l'partioj, kiuj dum ĉi tiuj lastaj jardekoj provis k sukcesis atingi la regpovon; k kvankam tio aperas paradoksa, ĝi trovas defendantojn eĉ inter niaj kunbatalantoj. Kontraŭ tiu ĉi koncepto trosimpligita pri la revolucio, kiu kondukus nin al respublika faŝismo, maskita sub la frigia ĉapo[2], sed tamen faŝismo, troviĝas la alia, la unusola, la vera k sole praktika, kiu direktos nin nepre al nia fincelo. Ĉi tiu volas, ke la preparado ne estu sole akcelata de kelkaj harditaj k batalemaj elementoj, sed ke oni okupu sin same pri la moralaj faktoroj, kiuj hodiaŭ estas la plej fortaj, plej detruaj k plej malfacile venkeblaj. La revolucio ne devas kalkuli ekskluzive je la aŭdaco de malplimulto pli malpli decidema, sed je movado, kiu disvolvos la spiriton de l'amasoj de la laborista klaso k kondukos ĝin al la definitiva liberiĝo, sub la gvidado de l'sindikatoj k de l'Nacia Konfederacio de Laboro, kiuj difinos la agadon, la manieron k la favoran momenton por la revolucio. ...

„Ni estas revoluciuloj; sed ni ne kulturas la miton pri la revolucio. Ni volas, ke la kapitalismo k kun ĝi la ŝtato, ĉu ĝi estas ruĝa, blanka aŭ nigra, malaperu, ne tamen por esti anstataŭigata per alia, sed por ke la organizita laborista klaso, post finfaro de la ekonomia revolucio, povu malhelpi la restarigon de ĉiu povo, kiu ajn estu ĝia koloro. Ni volas revolucion devenantan el la fundo de l'popolo, kiel tiu, kiun oni estas forĝanta hodiaŭ, k ne tiun, kiun oni prezentas al ni, reprezentatan sole de kelkaj pretendemaj individuoj, kiuj fariĝos fatale, kiuj ajn estu iliaj nomoj, diktatoroj, la sekvantan tagon post sia triumfo. Ke ĉiuj kunbatalantoj komprenu, kiaj estas la respondecoj en la escepta momento, kiun ni travivas. Ke ili ne forgesu, ke la revolucia agado povas nin konduki al la triumfo, ke se ni ne triumfas, ni devas fali digne, sed ke la revoluciaj penadoj izolitaj kondukas nur al la reakcio k la venko de l' demagogoj.“

Ne povas esti nia tasko esplori, ĉu la tiel averte parolantaj personoj pravas aŭ ne. Konigante tiujn faktojn, ni nur deziras altiri la atenton de la legantoj al la evolua procezo, kiu fariĝas en la interno de grava laborista organizo staranta en la batalfronto k kiu ne povas resti seninflua sur la estontan disvolviĝon de la laborista movado en tiu lando.

Laŭ diversaj fontoj kompilis N. B.

[2] Ruĝa ĉapo, signo pri libero. — *Red.*

LA de vi bezonatajn esperantaĵojn, librojn, broŝurojn, lernilojn ktp. aĉetu ekskluzive ĉe la ADMINISTREJO DE SAT, Kolmstrato 1, Leipzig O. 27.

Pri la kvinjara plano

AL LA SOCIALISMO AŬ AL LA FARAONISMO?

(1-a daŭrigo. Vd. la antaŭan n-on.)

La triumfo de la opozicio.

La ekzilitoj havis du punktojn en sia programo:

Disvastigo de la industrio;

Batalo kontraŭ la kulako.

Pri tiuj du punktoj, ili estis abundege kontentigataj.

Por la disvastigo de la industrio okazas la starigo k la efektivigo de la kvinjara plano. Por la batalo kontraŭ la kulako okazas la anstataŭigo de la individua kamparana entrepreno per la „sovĥozoj“ k la „kolĥozoj“ (kolektivigitaj bienoj).

Kvazaŭ la sovetia popolo atendis nur signalon, ĝi sin ĵetegis sur la du vojojn, kiuj estis ĵus al ĝi malfermataj.

La pligrandigo de la industria produktado antaŭvidita de la kvinjara plano estis grandega: temis pri tio pliigi dum kvin jaroj la ŝtonkarban produktadon de 35 milionoj da milkilogramoj ĝis 75 milionoj, la fandaĵan de 3 milionoj k duono ĝis 10 milionoj, la elektr-energian de 5 ĝis 22 miliardoj da kilovat-horoj; entute, la produktado devis proksimume esti kvarobligata; en fino de 1933, U.S.S.R. devis esti fariĝinta la plej grava produktanto de karbo post Germanio, Usono k Anglio. Nu, la antaŭviditaj nombroj estos certe, entute, atingataj; en iuj produktfakoj, ili estos eĉ sendube traf-itaj post kvar jaroj[1].

Koncerne la „kolektivigon“ de la bienoj, la rapido de ĝia ritmo superis multe pli ankoraŭ la antaŭkalkulojn. De ĝia komenciĝo ni montris (vidu „Proleta Revolucio“ de 15. dec. 1929), ke ĝia komenca irmaniero pruvis, ke temis tie pri ekstreme profunda fenomeno, pri vera dua revolucio. Tio estis speciale konfirmita de la fakto, ke, kiam la homo, kiu permesis ĝian ekfunkciiĝon, provis ĝin haltigi, aŭ, almenaŭ ĝin moderigi, li ne sukcesis en tio. La fama artikolo de Stalin en la *Pravda* (vidu „Prol. Rev.“ de 1-a de aprilo 1930) kontraŭ la malmoderoj de la kolektivigantoj ŝajnis antaŭludo al nova „vojturniĝo“. Oni rakontas, ke tia estis efektive la intenco de Stalin, sed ke la elementoj, sur kiujn li intencis sin apogi, lin perfidis k li troviĝis tiel sola kontraŭ siaj malnovaj amikoj, unuavice Molotov, kiuj volis daŭrigi la komencitan verkon, k antaŭ kiuj Stalin estis devigata sin klini. Ĉiuokaze, ĉu Stalin malsukcesis en sia „vojturniĝo“, aŭ ĉu li ne intencis ĝin fari, la fakto estas certa: la „vojturniĝo“ ne okazis. La kolektivigo de la bienoj daŭradis kun pli k pli vigla rapido: en la grenaj regionoj, 50% el la bienoj nun estas kolektivigitaj; la prisemadoj al la kolĥozoj k sovĥozoj, kiuj laŭtakse estis atingont-

[1] Oni kontraŭdiskutas, ke kelkaj laboraĵoj, antaŭviditaj en la Kvinjara Plano, ne estis realigataj, k ke aliaj, ne antaŭviditaj, devis, male, urĝe esti efektivigataj. Ĉikanoj estas tio! La grandec-grado de l'efektivigoj estas senproporcia kun la grandec-grado de la eraroj.

aj nur 20 milionojn da hektaroj je la fino de kvin jaroj, atingas jam 43 milionojn da hektaroj je la fino de la dua jaro: dum du jaroj la duoblo de tio, kio estis antaŭkalkulita por kvin.

Akcesore, ĉiuj restoj el la antaŭa periodo estis likviditaj. Oni „likvidis“ la kulakon sendante lin terkulturi en Siberio; oni likvidis la fremdajn koncesiojn, kiel Harimen, la Lena ktp ... k eĉ, lastatempe, tiun modelan koncesion, kiu estis ĉiam kiel ekzemplo prezentita al la eksterlandaj kapitalistoj dum la epoko, kiam oni serĉis per ĉiuj rimedoj altiri koncesiulojn: tiun konsentitan al la potenca sveda firmo S.K.F., specialigita en la fabrikado de l'rulglobetoj.

Tiel la triumfo de la ŝtata industrio, fariĝinta ankaŭ ŝtata agrikulturo, estas kompleta. La kapitalismo povas esti nun rigardata kiel definitive detruita en U.S.S.R.; ĝi perdis ĉiun esperon tie restariĝi. Ĉar, kune kun ĝia detruo, la problemo pri la produktada pligrandigo troviĝis solvita. Tiom longe kiom ambaŭ sistemoj kunekzistis, la progresoj de la produktado estis preskaŭ nulaj; en iuj fakoj, kiel la agrikulturo, oni eĉ enregistris pli ĝuste malprogresojn. Kun la triumfo de unu sola sistemo, la produktado, male, impetas same en la kamparo kiel en la fabrikoj. Ekde la dua jaro de la kvinjara plano, Rusio denove ludis sian rolon sur la grena mondmerkato.

La estanto.

La kapitalismo estas detruita: ĉu tio estas la socialismo?

Aŭ, almenaŭ, ĉu oni estas sur la vojo al la socialismo?

La socialismo ne estas la anstataŭigo per la organizita produktado, per la produktado laŭ plano, al la senordega burĝa produktado. Se ĝi estus tio, la starigo de trustoj k de karteloj estus — kiel cetere asertas aplombege kelkaj socialdemokratoj — etapo al la socialismo.

La socialismo estas la forigo de la plusvaloro, la forigo de la ekspluatado al la homo fare de la homo, la forigo de ĉiu eblo por unu klaso ekkapti la laborprodukton de alia, k tiel, la forigo de la klasoj.

Nu, por ke tio estu, por ke tio ne nur estu, sed ke ĝi estu efektivigotaĵo, estas unu nepra kondiĉo: la forigo de la ŝtato.

Estas tio, kion la anarkistoj unuparte, Marks k Lenin aliparte tre bone komprenis k tiom insiste klarigis la unuaj kiel la aliaj.[2]

Kio estas la ŝtato k kio la proletara diktaturo?

Kio estas, efektive, la ŝtato? La ŝtato estas armea forto.

Tiuj, kiuj komandas tiun armeon, havas la eblon, ĉar ili posedas la forton, forpreni, de aliaj, parton de ilia laborprodukto. Do, peti al iu ajn ŝtato plenumi la socialismon, forigi la plusvaloron estas tiel utopia kiel tion peti al monarko aŭ al filantropa miliardulo, tiel kiel faris ĝin la unuaj socialistoj. La memmortigo estas ebla individue, sed ĝi ne estas kolektiva fenomeno. Nenia klaso, nenia institucio povas labori por sin neniigi. Tiu, kiu posedas la kapablon ekspluati alian, ĉar li posedas sola la forton, tiu havas kiel funkcion ekspluati, k nepre ekspluatos.

Sed, dum Bakunin k la anarkistoj kontentiĝis pri tio aserti la neceson detrui la ŝtaton, Marks k Lenin precizigis la manieron, laŭ kiu la ŝtato povos esti detruata.

Ili ĝuste opiniis, ke estas infanaĉe kredi, ke tuj post la renversado al la kapitalista potenco oni povos subite malbezoni ĉiun estrecon[3]. Sed, por ne fariĝi nova ekspluatmaniero, tiu estreco devos esti la rekta estreco de la laboristoj, estreco senpere k kolektive plenumata de la proletaro.

La ŝtato estas distinga subprema forto. La unua ago de proleta revolucio devas esti forigi la ŝtaton, tio estas la subpremadon, organizitan kiel *distinga* forto. Sed kiel tamen la subpremado, la premega perforto estas necesaj tiom longe kiam la socialismo ne estos firme k definitive starigita, kiam ne estos elradikigitaj ĉiuj kapitalismaj restoj; do necesas, ke premega forto estu pluigata; k tiu premega forto ne iĝos forto por la subpremado k la ekspluatado al la laboristoj, se ĝi ne estas organizata kiel distinga forto, se ĝi estas *la proletaro* mem, rekte k per si mem aganta.

La anstataŭigo al la armeo k al la polico per la armita proletaro, kiu mem aplikas la povon, rekte, per la forto de siaj propraj armiloj, tia estas la sola ŝtatformo, kiu povas konduki al la socialismo, ĉar la sola, kiu povas forigi ĉiun ekspluatadon k ne nur igi ĝin ŝanĝi sian formon. Sed, tiam, laŭ la esprimo de Engels, „tio ne plu estas ŝtato en la propra senco de la vorto“; ĝi estas, laŭ la esprimo de Marks k Engels, „la proletara diktaturo“.

Ne la diktaturo de ŝtato, tio estas de polico, armeo, burokrataro, el la proletaro distingitaj (eĉ, se ili asertas esti submetitaj al la proletaro), sed la diktaturo de la proletaro mem, disponanta mem k disponanta sola pri la armila forto, sola fundamento de la potenco. (Daŭrigota) *R. Luzon.*

Tradukis la Alĝera Esperantista Grupo el la franca revuo „La Révolution Prolétarienne“ (La Proleta Revolucio).

[2] Por tiuj, kiujn mirigus tiu ĉi alproksimiĝo inter Marks, Lenin k la anarkistoj, ni citu tiun frazon de Lenin, eltiratan el „ŜTATO K REVOLUCIO“: „Marks samopinias kun Prudon (Proudhon) en tio, ke ili ambaŭ estas por la „detruo“ de la moderna ŝtatmaŝino. Tiun ĉi similecon inter marksismo k anarkismo (kun Prudon k ankaŭ kun Bakunin) nek oportunistoj, nek kaŭtskianoj deziras vidi, ĉar ili foriris de l'marksismo en tiu ĉi punkto.“

[3] Estas punkto, pri kiu devus nuntempe niaj hispanaj K-doj profunde konvinkiĝi.

La klasbatalo tra la mondo

La I.T.F. iniciatas helpmovadon por Ĉinio.

La sekretariaro de l'Internacia Federacio de l'Transportlaboristoj direktis al la Internacia Sindikatara Federacio la peton, ke ĝi bonvolu estigi — eventuale en kunlaborado kun la Socialista Laborista Internacio — internacian helpmovadon por Ĉinio. La peto entenis la sugeston, ke la laborista movado luu unu aŭ plurajn ŝipojn por transporti nutraĵojn de Nederlanda Hindio aŭ de unu el la mondpartoj, kie oni procedas al la detruado de nutroproduktoj, al la dezertigitaj regionoj de Ĉinio.

Laŭ speciala komuniko de ITF.

Viktimo de Musolini.

En la pundomo de Torino mortis la Sicilia laborista gvidanto, Francisko lo Sardo, unu el la plej aĝaj partoprenintoj en la Sicilia laborista movado. Li estis unu el la kreintoj de la Suditalia laborista movado, k oni elektis lin en la jaro 1919 kiel parlamentanon. Li estis kondamnita de la faŝista registaro je 15-jara pundoma restado, k el tiu tempo je kvinjara restado en unuopa ĉelo, kvankam tiutempe li jam estis sesdekjara. La malliberejo malfortigis k malsanigis lin, sed ne spirite. En letero, kiun li skribis ĵus antaŭ sia morto, li petis, ke oni sciigu al la Siciliaj laboristoj, ke li ne petos al la

La plej bona k amuza legolibro estas
KANDID
La ĉefverko de
VOLTER
en la esperanta traduko de
E. Lanti
kun antaŭparolo de l'tradukinto k ilu-troj de R. Bartelmes.
Laŭ la unuanima opinio de la recenzistaro la stilo estas modela, simpla, facillegebla.
Form. 13×19 cm. 160 pĝ.
Prezo 1.70 mk. g., bindita 3.— mk. g.
Administracio de SAT, Leipzig O 27, Colmstrasse 1

faŝista registaro iujn ajn favorojn. Kiam li fariĝis malsana, oni povus esti lin savinta per operacio, sed severa ordono el Romo malpermesis transporti lin en malsanulejon, k ĉar oni en la malliberejo ne povis lin operacii, la morto ekestis la rezulto.

En alia italia pundomo mortis laboristo nomata Fantini pro turmentoj de policistoj el Bolonjo.


Komunikis SAT-ano 7780.

Grava tago en Amsterdamo.

La tago de l'29-a de aŭgusto 1931 estis vere grava tago por la Amsterdamaj laboristoj. Ĉar tiam en Amsterdamo la holanda socialista laboristaro honoris per monumento la memoron de nobla pioniro, la fondinto de l'socialista movado en Nederlando, *F. Domela Nieuvenhuis*, kiu mortis en 1919.

Estis por Nieuvenhuis granda seniluziiĝo, kiam en 1914 eksplodis la mondmilito k nenie la laboristoj socialistaj proklamis la ĝeneralan strikon por malhelpi la fratmortigon. Li feliĉe en 1917 ankoraŭ povis vidi la starigon de la Sovetia respubliko laborista, k ĉi tiu okazo povis esti por li pruvo, ke fine ie laboristoj estis tiel prudentaj k fortaj, por forpeli la kapitalistaron nacian, k haltigi la ĝeneralan mortigon.

Kiam en 1919 Domela Nieuvenhuis estis forportata al la tombejo, dekmiloj da gelaboristoj akompanis lin al la lasta ripozejo. Estis vere impona okazintaĵo k tiom da homoj malantaŭ funebra procesio oni neniam antaŭe vidis en Holando. Multe da personoj, viroj same kiel virinoj, ploris, ĉar Nieuvenhuis estis tre popolara.



F. Domela Nieuvenhuis parolas al kampara popolamaso.

Antaŭ du jaroj kelkaj socialistaj unuiĝoj (fakaj k politikaj) fondis komitaton por kolekti monon inter la gelaboristoj, por starigi statuon de Nieuvenhuis sur taŭga loko en Amsterdamo. La komitato bonege sukcesis, la bezonata mono estis baldaŭ plene kolektita, k la Amsterdama komunumestraro donacis por la statuo lokon sur placo en laborista kvartalo. La 29-an de aŭgusto miloj da gelaboristoj el tuta Nederlando kolektiĝis en Amsterdamon, por ĉeesti la inaŭguron de la bela statuo. Centoj da unuiĝoj kunmarŝis kun belaj ruĝaj flagoj k standardoj en la amasirado al la placo, sur kiu la statuo estis starigita. Ankaŭ granda nombro da interesiĝantoj troviĝis laŭlonge de la stratoj, tra kiuj la irantaro pasis. Dum la inaŭguro kelkaj unuiĝ-reprezentantoj paroladis (ankaŭ eksterlandaj); orkestro muzikludis („Largo" de Hendl) k kantsocietoj kantadis. Unu el la parolintoj i. a. diris, ke la statuo devas esti por la gelaboristoj instigo daŭrigi la vojon de l'klasbatalo, kiu kondukos la laboristaron al pli bona socio.

Ni esperu, ke ĝi vere estos instigo tia, precipe por la junaj gelaboristoj.

J. L. (16458).

Ĉe la ministoj en Britio.

En n-o 357/58 de „S-ulo" mi legis pri la kondiĉoj en la germana karbindustrio: nu, en Britio estas simile, sed nia situacio estas plimalbonigita pro la „Industria Sindikato", kiun gvidas la perfidulo G. A. Spencer; ĉe kelkaj Notinghem-regionaj karbminejoj la laboristoj estas devigataj pagi al tiu organizo, ĉar la mono por ĝi estas deprenata de la semajnaj salajroj.

Komunisto Bunĉuk.

Fragmento el la romano de M. Ŝoloĥov: „La KVIETA DONO" (dua volumo).

En marto Bunĉuk estis sendita por laboro al la revolucia juĝejo ĉe la Dondistrikta revolucikomitato. Altkreska, malserenokula, konsumiĝinta de laboro k sendormaj noktoj, la prezidanto forkondukis lin al fenestro de sia ĉambro k diris, glatigante la manhorloĝon (li rapidis al kunveno):

– De kiu jaro vi estas ano de la partio? Aha, afereme. Do jen vi estu ĉe ni karcerestro. La pasintan nokton ni sendis en „stabon de Duĥonin" [1]) nian karcerestron ... pro koruptaĵo. Li estis vera sadisto, malkonvenulo, kanajlo, – tiajn ni ne bezonas. Ĉi tiu laboro estas malpura, sed en ĝi ankaŭ necesas konservi sendifektete konscion pri sia respondeco antaŭ la partio, k vi nur komprenu min, kiel necesas ... – akcentis li tiun ĉi frazon: – homecon konservi. Laŭnecese ni ekstermas fizike kontraŭrevoluciulojn, sed fari el tio cirkon ne decas. Ĉu vi komprenas min? Nu, bone. Iru por akcepti aferojn.

La saman tagon Bunĉuk kun taĉmento de ruĝgvardianoj el dekses homoj pafmortigis noktomeze post la urbo, je la tria versto, kvin kondamnitojn al pafmortigo. El ili du estis kozakoj de Gnilovskaja stanica-o [2], aliaj – loĝantoj de Rostov.

Preskaŭ ĉiutage en noktomezo oni elveturigis per ŝarĝaŭtomobilo post la urbon la kondamnitojn, porrapide oni fosis por ili kavojn, en la laboro partoprenis tiel la mortontoj kiel parto el la ruĝgvardianoj. Bunĉuk frontvicigis la ruĝgvardianojn, faligis bas-obtuzajn vortojn:

– Tra malamikoj de l'revolucio ... – k eksvingante per revolvero [3]: – Fajron! ...

Dum unu semajno li maldikiĝis k nigriĝis, kvazaŭ per tero kovriĝis. Fende faŭkis la okuloj, nerveme palpebrumantaj palpebroj ne kovris ties malsatan k sopiran brilon. Anno vidis lin nur dum noktoj. Ŝi laboris ĉe la Revolucikomitato, venadis hejmen malfrue, sed ĉiam atendis, kiam per konata mallonga frapo je la fenestro li sciigas pri sia alveno.

Unufoje Bunĉuk venis, kiel ĉiam, post noktomezo. Anno malfermis al li la pordon, demandis:

– Ĉu vi vespermanĝos?

Bunĉuk ne respondis, ebrie balanciĝante, li iris sian ĉambron k estinte en militistpalto, botoj k ĉapo, li falis sur liton. Anno aliris lin k ekrigardis la vizaĝon: okuloj liaj estis glue fermetitaj, sur vidigitaj densaj dentoj fajreris salivo, maldensaj eliĝantaj de tifo haroj kuŝis sur la frunto, kiel malseka fasko.

Ŝi sidigis sin apude. Kompato k doloro ungegis ŝian koron. Ŝi demandis flustre:

– Ĉu al vi estas malfacile, Elio?

Li fortpremis ŝian manon, ekgrincis per la dentoj, sin turnis al la muro. Tiel li ekdormis, dirinte neniun vorton, sed en sonĝo li ion neaŭdeble k kortuŝe balbutis, penegis saltleviĝi. Ŝi kun teruro ekvidis k ektremis pro neklarigebla timo: li dormis kun duonfermitaj, altenlevitaj okuloj, el sub la palpebroj inflame brilis flavo de konveksaj okulblankoj.

– Foriru de tie! – ŝi petis lin matene. – Iru pli bone fronton! Vi al nenio similas, Elio! Pereos vi de tiu ĉi laboro.

– Eksilentu! ... ekkriis li palpebrumante per de furiozo blankiĝintaj okuloj.

– Ne kriu. Ĉu mi ofendis vin?

Bunĉuk estingiĝis iel subite, kvazaŭ per ekkrio li elŝprucigis en la brusto

[1] – mortigis. Duĥonin, armeestro dum la epoko de Kerenski, estis en sia stabo mortigita de armeanoj. – *A. S.*

[2] Kozakvilaĝo.

[3] En originalo „per nagano" – laŭ la nomo de ties inventinto.

Mi citu nur unu ekzemplon pri nia manko de solidaro: Ĉe la karbminejo, kie mi laboras, oni instalis aŭtomatan karbogruz-elevatoron, kiu „manĝigas“ la fajregojn. Instalinte ĝin la mastroj maldungis la duonon de la hejtistoj laŭ kutima raciiga metodo. Sed kiam la elevatoro malfunkcias, k nur duona stabo el hejtistoj devas denove uzi ŝovelilojn, ili devas malgraŭ ĉio teni la saman vaporpremon de 60 kilogramoj al la kvadrata colo (= ĉ. 2,5 kvadrat-centimetroj). Ĉar ili malsukcesis fari tion spite fortostreĉoj, ŝvitado k ĉiuj penoj, *unu* el ili ricevis laboron malpli alte pagatan — k ni faras por li nenion!

Kiam ni karbolaboristoj starigos realan Internacion? Nur tiel ni saviĝos.

H. Hooper (17428), Mansfield.

Klasbataloj en Litovujo.

Kvankam ĉiuj laboristaj organizoj en Litovujo povas labori nur malleĝe, strikoj okazas dank' al la tre malbona situacio de la laboristaro. La 3-an de septembro okazis en la urbo Mariampole, en sukerfabriko, kiun konstruas sveda kompanio, grava striko. Ĉe la konstruado de tiu fabriko laboras 500 gelaboristoj. Ili devis labori 12 horojn tage, ankaŭ en dimanĉoj, k por tio ricevis nur 60 cendojn (1 lido = 100 cendoj = 0,10 dolaro) por unu laborhoro. Do, laboristo, kiu ŝvitas dum tuta tago, ricevas 7—8 lidojn por tago (0,70—0,80 dol.). La direkcio ankaŭ tre kruele kondutis al gelaboristoj: insultoj, mokoj, eĉ batoj estis ĉiutagaj.

La laboristoj ekstrikis k postulis: a) plialtigon de l'salajro je 20 cendoj hore; b) por dimanĉa laboro oni pagu duoblon; c) rekompencon por striktempo ktp. La sveda direkcio malakceptis la postulojn k venigis policon.

La 4-an de sept. policaj trupoj ĉirkaŭis la fabrikon k arestis la laboristajn delegitojn. Sed la laboristoj, post granda interpuŝiĝo, en kiu kvar K-doj estis vunditaj, reprenis la delegitojn. Dum tiu tempo okazis ankaŭ granda laborista kunveno, kiun partoprenis 400 Gek-doj. Estis ardaj paroloj kun la politika senco: „For la faŝismon, for la diktatorecon!“

La 5-an grandaj polic-rezervoj enmarŝis el Kaŭnas en Mariampolo. Post batalo la polico arestis 30 K-dojn. En la policejo ili estis kruele batataj, poste malliberigataj. Pli ol 20 personoj estis vundataj. La direkcio maldungis ĉiujn laboristojn k nun serĉas strikrompantojn.

Iom antaŭe strikis en Kaŭnas baklaboristoj. Ili laboris eĉ 14—18 horojn tage. Nur bone organizita striko savis ilin el tiu servuto. Tiuj strikoj klare montras, ke la litova laboristaro klaskonscias k batalas por siaj rajtoj.

K. Vincas.

Kies diro estas la ĉi-suba?

Kio unue frapas la okulon en nia epoko, tio estas ne nur la koncentrigo de riĉaĵoj, sed ankaŭ la akumulado de grandega potenco, de arbitra ekonomia povo, en la manoj de malgranda aro da homoj, kiuj, ĝenerale, ne estas la posedantoj, sed la nuraj depontenantoj, la mastrumantoj de la kapitalo, kiun ili administras laŭ sia bontrovo.

Kiu respondos ĝuste al la titola demando, ricevos surpriz-premion. La eldirinto estas fame konata en la tuta mondo. Skribu al la Redaktejo.

MI VOLAS SCII . . .

Demando: Kiu(j) elektadas la Lingvan Akademion esperantistan?

H. Schübel (13450).

Respondo: Laŭ la Regularo de la Lingva Komitato „4. La anoj de la L.K. estas elektitaj de la L.K. mem, per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, inter kandidatoj, kies liston preparas la Akademio. 5. Por starigi tiun liston, la Akademio grupigas: 1-e la anojn, kies 9-jara periodo de aneco finiĝis; 2-e la personojn, proponitajn por esti novaj anoj, laŭ la maniero montrata en la regulo 6-a.

„La Akademio eltiras el tiu grupo la esperantistojn, kiujn ĝi juĝas indaj fariĝi aŭ refariĝi anoj de la L.K., k starigas liston prezentotan al la voĉdono de la L.K.

amasiĝintan furiozon. Lace rigardante siajn manplatojn, li diris:

— Ekstermi homan fiaĵon estas malpura afero. Pafmortigi, ĉu komprenate, estas malutile por sano k animo. . . Jen ĝi . . . — k la unuan fojon en ĉeesto de Anno li malkonvene ekinsultis. — Por nigra laboro iras aŭ malsaĝuloj k bestoj, aŭ fanatikuloj. Ĉiuj volas iradi en floranta ĝardeno, sed ja, diablo ilin prenu! antaŭ ol planti floretojn k arbetojn, necesas malpuraĵon forigi! Sterkadi necesas! Manojn necesas malpurigi! — plialtigis li la voĉon, malgraŭ tio, ke Anno turninte sin silentis. — Malpuraĵon necesas forigi, sed tiun aferon oni malŝatas! . . . — jam kriis Bunĉuk, frapegante per pugno sur la tablon, ofte palpebrumante per sangoplenaj okuloj.

En la ĉambron ekrigardis la patrino de Anno k li, rekonsciiĝinte, ekparolis pli mallaŭte:

— Mi ne foriros de tiu ĉi laboro! Tie ĉi mi vidas, senteble mi sentas, ke mi utilas! Mi ŝovelas la malpuraĵon, sterkadas la teron, por ke ĝi estu pli huma! Pli fekunda! Iam sur ĝi irados feliĉaj homoj. . . Eble, mia filo irados, kiu ankoraŭ ne estas. . . — Li ekridis knare k negaje. — La muziko de estonto . . . ĉu vi memoras, Anno?. . . Kiom da tiuj fihomoj . . . akaroj mi pafmortigis. . . Akaro estas tia insekto, kiu en korpo enmanĝiĝas. . . Ĉirkaŭe dekon jen per tiuj ĉi brakoj mi mortigis. . . — Bunĉuk etendis antaŭen kunpremitajn, kiel de milvo, ungegriĉajn, nigraharajn brakojn k, faligante ilin sur la genuojn, flustre diris: — Kaj ĝenerale al diablo! Se bruli, do tiel, ke fajreroj flugu, sed fumi ne necesas. . . Nur mi, vere, laciĝis. . . Ankoraŭ iom k mi foriros fronton . . . vi pravas. . .

Anno silente aŭskultinte lin, mallaŭte diris:

— Foriru fronton aŭ alian laboron. Foriru, Elio, aliel vi . . . elartikiĝos. Bunĉuk sin turnis al ŝi dorsen, ektamburis sur la fenestro.

— Ne, mi estas forta. . . Vi ne pensu, ke ekzistas homoj el fero. Ĉiuj ni estas el la sama materialo fanditaj. . . En la vivo ne estas tiaj, kiuj ne timas la militon k ne estas tiaj, kiuj, mortigante homojn, ne havus . . . ne estus morale gratitaj. Sed ne pri tiuj, or-epoletuloj, doloras la koro. . . Tiuj estas konsciaj homoj, kiel mi k vi. Sed jen hieraŭ okazis, ke necesis elinter naŭ pafmortigi tri kozakojn . . . laborulojn. . . Unu mi komencis malligi. . . — La voĉo de Bunĉuk iĝis pli obtuza, neaŭdebla, kvazaŭ li foriris ĉiam pli k pli malproksimen: — mi tuŝis lian manon, sed ĝi estas kiel plando . . . malmola. Ĝi, kovriĝinta per seninterompaj kaloj. . . La nigra manplato fendiĝis . . . tute frotvundita . . . tuberplena. . . Nu mi iru, — abrupte ĉesigis li la paroladon k, nerimarkeble por Anno, frotis la gorĝon kuntiritan, kiel de harara ŝnurkaptilo, per malmola spasmo.

Li botvestiĝis, trinkis glason da lakto, ekiris. En la koridoro lin atingis Anno. Daŭre ŝi tenis lian pezan harriĉan manon en siaj manoj, poste alpremis ĝin al flagranta vango k elkuris sur la korton.

El la rusa tradukis A. Sidorov, Rostov-Don.

Menciu nepre esperanton ĉe represigo de artikoloj esper.-devenaj!

POR NIA DISTRO

Dum intervjuo, raportisto demandis mondfaman bankieron pri la origino de lia kariero. Respondis la bankiero: „Iam, dum mi estis ankoraŭ junulo, estante senlabora, mi luis butikon k pentrigis sur la montrofenestron la vorton „BANKO“. La unuan tagon iu malsaĝulo deponis kvindek dolarojn. La sekvantan tagon alia frenezulo deponis cent dolarojn. Tiam mi konvinkiĝis, ke la entrepreno sukcesas k deponis miajn proprajn dek dolarojn.“

El „Ĉirkaŭ la Globo“ (sept. 1931).

SENNACIULA PEDAGOGIA PAĜO

Redakcia adreso; K-do Simon Aarse, Veeteeltstrato 63, Amsterdam (Holando).

Pri la instruada batalo en Nederlando.

En la sekvantaj linioj mi intencas doni skizon pri grava batalo en la nederlanda instruado, kiu ankaŭ certe interesos la tutan SAT-anaron, ĉar la menciita lukto multe miksiĝis kun politikaj problemoj. Ĝi ne nur estas batalo pri instruado, sed ankaŭ instrua ĝi estas, do menciinda en la pedagogia paĝo.

Iom da historio. – Post la franca revolucio la burĝaro per sia politika partio transformis la instruadon k per la parlamento liberigis ĝin el la manoj de la eklezio (1806). La instruado ne estis libera. Regula estis la publika ŝtata lernejo, eklezioj k privataj institucioj rajtis fondi lernejon, sed laŭ submetiĝo sub la leĝon k registaron. Oni bezonis do permeson.

Kiam Belgio apartigis sin de Norda Nederlando, ĝi tuj ŝanĝis la leĝon k deklaris la instruadon libera. En Nederlando la antaŭa stato daŭris ĝis 1848. Tiam ankaŭ sekvis la sama deklaro. Kion signifas tio?

Se privataj institucioj volis fondi lernejon, ili estis tute liberaj, sed ne estis helpataj per monsubteno de la ŝtato. En 1857 oni aldonis la frazon: „La instruisto ne faru, ne instruu aŭ allasu ion kontraŭ la respekto ŝuldata al la *religiaj* ideoj de alipensantoj.“

Tiu frazo bone karakterizas la spiriton nederlandan. Laŭ la leĝo ne ekzistas senreligiuloj aŭ almenaŭ al ili ne respekto estas ŝuldata. Do la neŭtrala instruisto publiklerneja povas libere ataki, ofendi, insulti liberpensulojn ktp.

Nun venas tre grava parto el la instruada batalo. La liberon la religiuloj konkeris, nun la granda celo estis konkeri *infanojn k monon.* La unuan gravan atakon kontraŭ la publika lernejo faris papo Pio la IX-a. Li malaprobis la religian liberon, la liberon por parolo k gazeto, k samtempe celadis submeti la lernejon al la potenco de la eklezio k akiri la liberon k egalon en la instruado. Li ekkriis la devizon: La lernejon *al la gepatroj!* Tio signifas: *al la eklezio!*

La protestantoj fondis asocion por starigi lernejojn, k ankaŭ la okulojn fiksante al la celo akiri *monon* k *infanojn* ili komencis ataki la publikan neŭtralan lernejon. En kia maniero? En religia maniero. En la protestanta gazeto aperis juĝoj pri tiu malamata ŝtata institucio. Eble vi scivolas pri religia deco. La publika lernejo estis nomata: *kreaĵo de la diablo, institucio de malpuruloj,* la fatala patrino, kiu ensuĉis la infanojn, la kontraŭkristana veneno, *pli malbona ol alkoholo, infano de konkubino; pesto k kancero de nia* epoko; teruraĵo de idoladorado.

Tio ne sufiĉis. Per malmoralaj rimedoj, ekonomia devigo i.a., ili igis la gepatrojn sendi siajn infanojn al la protestanta lernejo. Oni sukcesis. En 1889 la privata lernejo ricevis iom da mono de la ŝtato. La lernantaro de la privata lernejo de 1879–1889 kreskis je 56 070 infanoj, la publika havis kreskon je 48 479. La asocio de publikaj instruistoj miksis sin en la batalon k tre ĝuste deklaris la aferon kiel pedagogian. La membroj faris grandan propagandon por la neŭtrala publika lernejo k tuj la reago ĉe la religiuloj ekestis.

Kiel? eble vi denove scivolas. Nu, mi donas unu ekzemplon: En la jaro 1909 aperis en Frislanda gazeto artikolo kontraŭ la publika lernejo de stultulo aŭ fia predikisto. En legolibro staris infanverseto, komenciĝanta per jenaj linioj:

> Mi estas eta, tamen senpeka.

Tre simpla, ĉu ne? Sed laŭ la menciita gazeto granda blasfemo kontraŭ la biblio. Oni verkis jenon: „Ĉu tiu mensogo ne blasfemas kontraŭ la biblia vero? Ĉu David ne ekkriis: Vidu, en peko mi naskiĝis k peke mia patrino ricevis min? Oni neas per tiuj linioj la fakton de la hereda peko. Oni forigas tiel en la infanoj la bezonon al Kristo k lia laboro. En la publika lernejo oni predikas, ke la infanoj estas senpekaj k tiel oni edukas farizeojn aŭ ulojn, kiuj neas Dion.“

Alia verseto temas pri la suno:

> Suneto, kia bona estas vi!
> Kial mi ne laŭdu vin?
> Jes, ĉiam danka estos mi.

Ankaŭ tiuj linioj estis teruraj. Ĉi tiu verseto forkondukas la infankoretojn de Dio. „Danko al la suno k al la kreinto. Tio eble estas nekonscia, sed tiu verseto, per kiu oni venenas la koretojn en la publika lernejo, predikas ardan malamon kontraŭ la Dio de ĉielo k tero. La surskribo ne taŭgas. Estas skribite: *Al la Suno.* Tio estas sensencaĵo. La suno estas malvivaĵo. Ĉu vi scias, kio decus stari tie? Unu vorto: *Di-neigo.* – Publika lernejo, vi, kiu volas esti neŭtrala k ne povas, vi disĵetas la semon de la Revolucio, vi instruas danki k laŭdi la sunon, vi instruas nei Dion k lian Kriston. Publika lernejo, en sia kolero Dio lasis vin aperi, en sia boneco li malaperigos vin. Publika lernejo, vi estas pesto k kancero. Vi estu ekstermata.“

Vi ekscias el tio, ke la religiuloj, por akiri lernantojn k monon, ne estas tre elektemaj k eble ne posedas hontosenton. Tia mondo, tiel malriĉa je spirito, konvinko, honesto k deco, klopodis konkeri la lernejon, volis posedi la infanojn, volas defendi la socion kontraŭ revolucio. Eble vi kontraŭdiros, ke tio okazis en 1909. Sed en sekvanta artikolo, en kiu mi priskribos mian propran spertaron, vi vidos, ke en 1930 oni utiligis la saman vortaron. Ĉu oni venkis? Jes, tiu hipokritula mondo tute venkis en Nederlando. En la jaro 1857 estis donata libero por fondi lernejojn. Precipe protestantoj utiligis tiun liberon.

En 1857 estis 58 lernejoj bibliaj
en 1871 estis 300 lernejoj bibliaj
en 1879 estis 1102 lernejoj privataj
(do inter ili ankaŭ katolikaj).

En 1889 estis 1244 lernejoj privataj; en 1889 oni akiris la unuan monhelpon de la ŝtato. Ĝi pagis triononon el la kostoj. En 1899 estis 1448 priv. lernejoj k 3096 publikaj. En 1901 la ŝtato ankaŭ pagis iom el la konstru-kostoj. En 1905 estis 1685 priv. lernejoj k 3255 publikaj. Triono el la tuta infanaro eniris la privatan lernejon. En 1905, nova leĝo, pli alta subteno. En 1912 oni altigis la subtenon rilate la konstrukostojn ĝis $62^1/_2$ %, k en la publika lernejo ĝi restis 25 %. Unuafoje la privata lernejo akiris pli grandan favoron. En 1920 oni atingis la tutan egaliĝon, k oni kreis por la instruado entute grandan mizeran ĥaoson.

Oni tre facile povas fondi mem lernejon. La ŝtato pagas la instruistojn, la urbo la ejojn k lernilojn. En urbo oni bezonas 100 infanojn, en vilaĝo nur 40 por havigi al si la permeson fondi mem lernejon, nomi k maldungi mem instruistaron. La lernejon al la gepatroj! Tio lasta ankaŭ signifas „al la eklezio“, precipe ĉe la katolikoj. Kiam la leĝo en 1920 aperis, donanta plenan egalon, oni ekkriis en preskaŭ ĉiu gazeto: La instruada batalo estas finita. Sed fakte ĝi komenciĝis nur!

Ĝi fakte apartenas al la pedagogia tereno, sur kiun la instruistaro metis ĝin, sed ĝi ekestis kiel politika batalo. Entute ĝi estas granda kultura batalo, en kiu la eklezio venkis en kunlaborado kun ĉiu politika partio, ankaŭ kun la socialdemokrata. Pri tio mi verkos iom sekvantan fojon, priskribonte la nunan ĥaosan staton.

S. Aarse (17013).

Ĉefa fonto:
Raporto de asocio de Nederl. instruistoj.

Ĉe la instruistoj.

En Stokholmo okazis la kongreso de la Federacio Internacia de Asocioj Instruistaj. Ĉeestis delegitoj el 26 diversaj asocioj naciaj, reprezentantaj 607 540 edukistojn de 20 milionoj da infanoj. Oni esprimis simpation rilate malarmadon, petis al la naciaj asocioj faciligi la venontan konferencon. La delegitoj estis devigataj deklari en sia propra lando, ke la Federacio kontraŭstaros ĉiun militistan edukadon en la lernejo. Esperanto ne estis priparolata.

En Hamburgo okazis internacia Somerlernejo por instruistoj. Oni pleje priparolis la problemon pri la neŭtralo.

(Daŭrigo de paĝo 5)

„6. La proponoj pri novaj anoj venas, ĉu de la Propagandaj, ĉu de la Aplikaj k Specialaj Esperantistaj societoj[1] k grupoj, ĉu de la Lingva-komitatanoj k de anoj de aliaj altaj esperantistaj institucioj. En ĉiu lando, la Akademio komunikas la kandidatliston al la koncernaj naciaj asocioj, petante ilian opinion.“ – El la „Jarlibro de la Lingva Komitato k de ĝia Akademio“ (1929).

[1] Notinde estas, ke neniam la SAT-estraro proponis iun ajn.

Respondo al K-do 4406.

(Vidu „S-ulo“-n n-o 360.)

Vi plendas, ke en „Bulteno de CK SEU“ oni avertas niajn sovetiajn Gekdojn ne korespondi kun socialdemokrataj perantoj de SAT. Nu, ortodokso ekzistas en ĉiu politika partio kiel en ĉiu religio. Ankaŭ la socialdemokrata partio rekomendas al siaj membroj legi nur socialdemokratajn gazetojn k librojn. Socialdemokratoj, kiuj vojaĝas al Sovetio aŭ Italio, estas eksigataj el la partio. La kialoj ja estas pretekstaj. La partigvidantoj ne volas esti kontrolataj de la partianoj. Se ĉi tiuj ricevas nur unuflankajn informojn, ili restas obeantaj; alikaze ili povus fariĝi kritikemaj k eĉ ribelemaj. Tiurilate ĉiuj partioj treege similas.

Estas grava merito (miaopinie la *plej* grava) de SAT, ke ĝi informas siajn geanojn ne unutendence, sed superpartiece. La SAT-anoj el la diversvidpunkte verkitaj artikoloj de „S-ulo“ povas konstati, ke jen la komunista, jen la socialdemokrata doktrino pravas. Sed *tio* ne plaĉas al la politikaj gvidistoj. *Tial* SAT estas atakata de komunistoj k nur hezite aprobata de socialdemokratoj.

Ni esperu, ke la homoj spirite tiel evoluos, ke ili rifuzos politikan kuratorecon. Laŭ mia sperto ankaŭ la sovetianoj ne blinde ripetas, kion la eminentuloj prezentas al ili. (Strange nur estas, ke ĝuste la sovetiaj opoziciuloj, kiuj riproĉas al la SAT-direkcio, ke ĝi „ŝtopas al la opozicio la buŝon“, malebligis la eniron de „S-ulo“ en Sovetio.) La estonto ja montros, ĉu la plimulto de lab.esp-istoj jam estas *matura* por la ideo de l'superpartieco aŭ ne.

Vienano.

Leo Tolstoj

ĤODINKA

Du rakontoj de la fama verkisto, ilustritaj per reproduktoj de artpentraĵoj. Kun enkonduka artikolo de K-do N. Modenov k skizo de Akademiano V. Friĉe pri L. Tolstoj kiel moralisto. – *64 pĝ. Prezo: 0,60 mk.g.*

Adm. de SAT, Kolmstrato 1, Leipzig O 27.

POR NIA MEDITO.

Ies bono dependas de ĉies bono.

La laboro de iu profesio egalvaloras kiel tiu de alia profesio.

La manlaborado estas la sola, kiu indas esti praktikata.

Gandhi, laŭ libro de Ruskin.

TRA ESPERANTIO

Kie restas la esperantistoj?

Dum la lastaj jaroj mi legas multon pri la sukcesoj de esp-o k multaj kursoj por komencantoj estas aranĝataj. Ĝenerale tiuj kursoj havas en la komenco multe pli grandan nombron da partoprenantoj ol en la fino. Se la kurso estas bone k agrable gvidata, ni povas supozi, ke la forirantoj ne taŭgas por fariĝi esperantistoj.

Sed tiuj, kiuj jam montris la persistemon sekvi la komencan kurson ĝisfine k tute tralerni la elementan lernolibron, povus fariĝi aktivaj esperantistoj. Tamen ni povas konstati, ke nur tre malmultaj el tiuj restas anoj de iu Esp-Grupo. Kaj la nombro de tiuj, kiuj sin poste dediĉas al la per-esp-a laboro, estas tute malkontentiga.

Konsiderante la „sukcesojn de esp-o“, priraportitajn en la lastaj jaroj, ni povus atendi tre grandan kreskon de nia SAT, eĉ malgraŭ la opozicia fiagado. Tamen la novaj membroj ne abundas!

Kio estas la kaŭzo de ĉi ĉio?

Mi povas juĝi nur pri Nederlando, k laŭ mi ĉi tie mankas la ligiloj por teni la malfortulojn en la movado. Ekzistas ekzemple sufiĉe da elementaj lernolibroj, sed neniu kompleta daŭriga lernolibro. Jes, ekzistas libretoj pritraktantaj la gramatikajn malfacilojn, aŭ libreto enhavanta multajn esprimojn pri ĉiaj temoj kun la nederlanda traduko; iu gazeto donas ekzercojn por traduki esp-en k poste pritraktas la malfacilojn. Sed tiuj partoj devus esti kunigataj en unu libron, ekzemple la tradukendan ekzercon antaŭiru listo kun vortoj k esprimoj k gramatika parto, tiel ke ĉiuj partoj rilatas inter si. La tradukojn *el* esp-o oni ankaŭ atentu.

Eble iuj preferas daŭrigan libron laŭ la rekta metodo, sed tia ankaŭ ne estas uzata laŭ mia scio.

La fervoraj esp-istoj k la estraroj de la esp-unuiĝoj ofte laboregas, sed ŝajne nur malofte laŭ la bona direkto. Ĉar ili ne sufiĉe atentas la forfluon de la lernantoj k membroj. Ĉi lastaj estas ofte nur ligataj al la esp. movado per la kurso, k kiam la kurso finiĝas, ili malligiĝas. Pro tio mi volas atentigi pri la dezirindo de pli da daŭrigaj kursoj (se eble kun daŭriga lernolibro). La tempospaco inter la komenca kurso k la daŭriga kurso ne devas esti longa.

Dum la daŭro de la kursoj, la kandidatoj devas esti enkondukataj en la per-esp-a laboro; kelkiuj povas fariĝi kursgvidantoj, estraranoj ktp. Tiel ili restos en la movado, ankaŭ post „finstudo“ de la lingvo.

Ĉar la kresko de SAT tute dependas de la kresko de la lab. esp. movado, mi opinias ĉi tiun temon sufiĉe grava por pridiskuto en la kolonoj de „S-ulo“. Kiu do faros aldonojn aŭ ĝustigojn?

14561.

Al la posedantoj de SAT-akcibiletoj.

Dum tiu ĉi jaro multaj aĉetintoj de akcibiletoj de la Eldonkooperativo de SAT resendis ĉi tiujn por aĉeti librojn, pagi „S-ulo“n k membrecon. Alia parto repostulis sian monon. Estas kompreneble, ke ni senprokraste, se tiuj akcibiletoj ne estis de iu sovetia aĉetinto, repagis la monon aŭ liveris la petitan varon. Al niaj sovetiaj K-doj ni rekomendis, sendi siajn akcibiletojn al CK SEU, por repostuli la ekvivalenton de nia konto ĉe CK SEU. Certe en ĉi tiu procedo CK SEU ne havas „valutajn malfacilojn“?! Pri la sukceso aŭ malsukceso de ĉi tiu faro ni ĝis nun nenion aŭdis. Eble CK SEU kontentigis la sovetiajn klientojn.

Hodiaŭ per reteno de nia mono en Moskvo ni estas devigataj, momente rifuzi la kontantan pagon de resendataj akcibiletoj, pro manko de fluanta mono. Certe, post venko de la krizo, ni revalidigos la normalan staton k denove ankaŭ repagos ĉi tiun monon.

Tiu ĉi nia decido ne trafas tiujn, kiuj pagas per la SAT-akcibiletoj, ĉu librojn de SAT eldonitajn, ĉu abonon al „S-ulo“, ĉu la membrecon al SAT.

Direkcio k Administracio.

EN NIA MOVADO

KRONIKO

Germanio. *Ŝtutgart.* En „Immenreuthe“ ap. Gajslingen okazis je 29.-30. 8. renkontiĝo de SAT-anoj k aliaj lab.esp-istoj. Ĉar multaj Gek-doj en nia regiono eksiĝis el GLEA, K-do 11067 parolis pri la neceso starigi „Labor-Unuiĝon“ el lab.esp-istoj k SAT-anoj en Virtembergo. Montriĝis, ke ekzistas K-doj, kiuj nek emas aniĝi al SEA, nek resti en GLEA, kiu estas tute partiece gvidata. En aŭg. n-o de „Arb. Esperantist“ (oficiala organo de GLEA) oni ekz. povis legi jenon: „Proletoj, neniajn pliajn intertraktojn aŭ kompromisojn kun la klasperfidaj Lanti k Ko!“ Ĉiuj ĉeestintoj interkonsentis, ke kunlaboro kun GLEA ne plu estas ebla nek utila. K-do 11067 rekomendis, ke laŭeble ĉiuj Gek-doj

aliĝu al SAT. Estis diskuto pri tio, ke la unuopaj grupoj k unuopuloj el la distrikto reciproke subtenu sin k aranĝu laŭeble publikajn kunvenojn, laŭokaze kune kun aliaj organizoj. Plue oni priparolis la neceson dum aŭtuno instali ĉie esp.kursojn, por poste fortigi la SAT-movadon. La interligilo „Voĉoj de SAT-anoj“ (kiun eldonas SAT-anoj el Ŝtutgart jam depost julio 1931) estos la bulteno de la „Labor-Unuiĝo“. *Librojn k aliajn esp-materialojn la Gek-doj estonte ekskluzive mendos ĉe la Admin. de SAT en Lajpcig.* Unuanime estis akceptita jena rezolucio: „Por firmigi la rilatojn inter SAT-anoj k aliaj lab. esp-istoj en nia distrikto, ni decidas, nin subteni reciproke en niaj taskoj k konsideras la gazeton monatan „Voĉoj“ kiel nian interligilon. Ni malakceptas la agadmanieron de l' nunaj LEA-estraro k redaktoro, kiu traktas ĉiujn K-dojn plej malnoble k neprolete, kiuj havas alian mondkoncepton aŭ opinion. Ni interkonsentas, ke la lab. esp-istoj en nia regiono interrilatu k kontaktiĝu per „Lab.Unuiĝo“. SAT-on ni rigardas kiel solan, internacian prol.esp-istan organizon. Vivu la superpartieco de l'tutmonda lab.esp.movado!“ Post raporto de K-do Vagner pri la Amsterd.Kongreso finiĝis la renkontiĝo, kiu evidente pruvis, ke la SAT-anoj regione en Germ. devas nepre kunlabori. Kiu interesiĝas aŭ volas aliĝi al nia „Lab.Unuiĝo“, turnu sin al K-do H. Vagner, Böblingerstr. 32 a, Stuttgart. *Ulo.* Hispanio. *Valencio.* Pluraj K-doj fondis ĉi tie Lab. Esp-istan Grupon, al kiu tuj aliĝis multaj simpatiantoj. Ni celas en baldaŭa tempo inundi per esp-o ĉiajn lab.rondojn. Momente ni ekmalfermis 4 kursojn en k ekster Valencio, kiujn ĉeestas multaj personoj. Ni komencis ankaŭ raporti en la loka gazetaro pri esp-o k pri nia grupo, kies adreso estas: Grupo Laborista Esp-ista, str. Embajadov Vich, 13-1°, *Valencio.* – Orkestro Esp-ista, fondita de pluraj K-doj pasintan jaron por la propagando de esp-o k konsistanta nun el 20 kordinstrumentaj ludantoj, ludas publike preskaŭ ĉiudimanĉe. Antaŭ nelonge la orkestranoj organizis mem ĉe la teatro ludon de komedio, k prezentis poste koncerton. La ĉeestantaro, kiu tute plenigis la salonon, ĝoje aplaŭdis nian laboron. En la fino paroladis K-do R. Kiles, kiu per juneca varmo skizis pri esp-o k muziko, montrante la altan signifon de ambaŭ universalaj lingvoj. Multaj interesiĝis pri nia lingvo k sekvantan tagon la loka gazetaro favore raportis pri nia prezentado. *(13661).* Hungario. La lab.esp.movado en Hung. dum la lasta tempo reviglliĝis. En la ejo de la Centro daŭras potenca kurso por komencantoj, kiun gvidas K-do E. Baranyai laŭ rekta metodo. Partoprenas 47 tre seriozaj Gek-doj. En *Pesterszebet* la grupo aranĝis bone sukcesintan ŝipekskurson. Ĉiusemajne lekcioj. Serioza laboro. En *Szeged, Szombathely, Debrecen, Békcscaba* la movado reviglliĝis. La Centro translokiĝis al nova ejo. Adreso: *Budapest*, Dob-u 90. Oficialaj vizithoroj ĉiutage. La CK de HESL ellaboris planon por supera kurso, kiun gvidas 4–5 kompetentuloj. La celo de tiu kurso estas eduki estontajn instruantojn. Nederlando. La „Grupo Zamenhofa“, sekcio de Ned. LEA en Amsterdamo, decidis enskribigi ĉiujn siajn membrojn, kiuj dum tuta jaro pagis la kotizon al la sekcio, *kiel SAT-membrojn pasivajn.* Tiu aranĝo ekvalidos proks. jaron. – *La grupa SAT-perantino, 16 599.*

EKSTER NIA MOVADO.

Malgraŭ la klopodoj de instruantoj laŭ Ĉe-metodo k grandskale organizitaj kursoj tra la tuta lando, k ankaŭ multa propagando en la nacilingva gazetaro, en Estonio la neŭtrala landa Asocio esperantista havas, laŭ statistiko de 1930, nur 401 anojn.

Okaze de granda nordlanda kontraŭalkohola kongreso en Helsinki estis aranĝita speciala kunveno de esperantistaj abstinentuloj, sekve de kies agitado la ĉefprezidanto de nordlandaj abstinencaj kongresoj promesis proponi al la C.K. pritrakti la demandon pri esp-enkonduko ĉe la kongresoj.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Internationale Sprachnormung in der Technik besonders in der Elektrotechnik. (Internacia lingvo-normigo en la tekniko, precipe en la elektrotekniko.) De d-o inĝ. *Eug. Wüster.* Eldonita kun subteno de la Akademio por Konstruaferoj. Berlin 1931. VDI-Eldonejo. 431 paĝoj k 4 tabeloj. Form. 17 × 24 cm. Tole bind. Prezo 20 mk.g.

Tiu ĉi atentinda verko estas eldonita per la rimedoj de l'Asocio de Germanaj Inĝenieroj. Tio estas propaganda faktoro de ne subtaksinda signifo, kiu montras, ke en la inĝeniera medio oni jam konsideras serioze la problemon de l'artefarita lingvo ĝenerale k de esp-o aparte. Vere, ĉi tiu ampleksa verko de l'konata vortaristo kulminas en la elmontrado de l'valoro de esp-o; k tiel ĝi estas unuaranga propaganda verko por la medioj, al kiuj ĝi estas destinita, sed tre interesa ankaŭ por ĉiuj aliaj germanlingvanoj. Wüster donas analizon pri la lingva evoluo (ĉefe rilate al teknikaj terminoj), montras la celadon al normigo en la teknika lingvo (ekonomieco de lingvo), la lingvan kunordigon (speciale esplorante la eletroteknikan fakon) k finas rekomendante esp-on kiel solvon de la problemo de „planlingvo“ en la tekniko, pruvante per multaj argumentoj k citoj ĝian taŭgecon. La praktika uzado i.a. estas montrata per statistika materialo, k ni trovas multajn atentigojn k nombrojn pri la agado de SAT, pri „S-ulo“, niaj kongresoj ktp. – La libro estas bele prezentita k klare aranĝita, sed bedaŭrinde ne havebla al malriĉaj proletoj. *N. B.*



K-doj! Perantoj! Grupestroj!

Organizu la unuopan vendadon de „S-ulo“-N-oj al neabonantoj en via loko!

Miniaturoj de *G. D. Nash.* Eldonis: The British Publishing Co.: Adr. B.E.A. 142, High Holborn, *London W.C. 1.* Prezo: 2 ŝ. 6 p. 58 pĝ. Form. 12 × 18 cm.

Ne! k ree ne! tio ne estas poezio! Ja tie ni trovas ritmojn variajn, ian verskonstruadon; sed kiom malsimpla, kiom artifika estas la lingvaĵo! Mi povas diri uzante la vortojn de l'„poeto“: „Elsenkuraĝigite“ mi „rife malridetas“! Strange malloga, akra k plejparte neflua estas tiu tamen en ritmojn premita lingvo! Krome ankoraŭ neologismoj malfaciligas la legadon; la troa uzo de „ec“ precipe en la rimoj estas estetika k lingva manko. 2 aŭ 3 sukcesintaj versaĵoj („La aĉa hundido“) ne pravigas la eldonon de tiu ekstere tiel bele prezentita libreto. *N. B.*

Domo de Homamo. Projektoj k opinioj pri la „D. de H.“. Ĉefa iniciantinto k protektanto Majstro Onisabro Deguĉi, Prezidanto de Universala Homama Asocio. Eld. de *Oomoto Internacia*, 1, rue Félix-Faure, Paris 15. 14 pĝ. (hektograf.); form. 12×16. Prezo: 1 intern. respondkupono.

Propaganda broŝuro de la Oomotosekto por la kreo de templo kun supra titolo.

MEMORNOTO

Represis el „S-ul-o“:

L'Effort, Lyon, 25. 7. (Perer-raporto pri Ĉinio; el Svedio, el Usono, el Japanio).

Pri la SAT-Kongreso raportis:

New-Yorker Volkszeitung, 23. 8.; *Industrial Solidarity*, Chikago, 1. 9.; *Volkszeitg.*, Düsseldorf, 27. 8.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Leipziger Lehrerzeitung, n-o 26; *Signalen*, Stokh., 10. 9.; *L'Avenir Socialiste*, Lyon, 25. 7.; *L'Effort*, Lyon, 25. 7., 12. 9.; *Arbeiter-Tribüne*, Stuttg., 29. 8. (mencias SAT); *Aufstieg*, Stuttg., 1. 7. (naturamika renkontiĝo esp-ista), 1. 8. (leteroj de SAT-anoj el Francio); *Volkszeitg.*, Düsseldorf, 23. 7., 27. 8.

NIA POŜTO

16 652. – En la nuna formo via versaĵo estas tute presinda. – *Red.*

ENHAVO

	paĝo
Kiun direkton sekvos la laborista movado en Hispanio?	1–2
Pri la kvinjara plano	2–3
La klasbatalo tra la mondo	3–5
Komunisto Bunĉuk	4–5
Kies diro estas la ĉi-suba?	5
Mi volas scii ...	5
Por nia distro	5
Sennaciula pedagogia paĝo	6–7
Por nia medito	7
Tra Esperantio	7
Recenzejo	8

Presejo: Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)